

KOMENCANTO

gazeto por komencantaj aŭtoroj kaj komencantaj esperantistoj



Nina Vinnikova [NOVOALTAJSK, Ruslando]

2000

redakcie — literatur-historiaj paĝoj — omaĝe al William Auld
novjare kaj poetike — ŝercaj paĝoj — fabloj — aforismoj
vortludo — anekdotoj — korespondu!
Abonu KOMENCANTOn por 2001 !

8

Perantoj de KOMENCANTO

ĉe tiuj adresoj vi povas aboni nian gazeton

Argentino Argentina Esperanto-Ligo, Casilla de Correo 2910 - Correo Central, AR-1000 Buenos Aires.

Aŭstralio Libroservo de AEA, Esperanto-domo, 143 Lawson St., Redfern N.S.W. 2016

Belgio Flandra Esperanto Ligo Frankrijklei 140, BE-2000, Antwerpen

Brazilo Brazila Esperanto-Ligo, Caixa Postal 03625, Brasilia (DF) - BR - 70084-970

Britio Esperanto-Asocio de Britio, 201 Felixstowe Road, Ipswich, IP3 9BJ

Ĉeĥio Vladislav Hasala, A.Dvoráka 1, CZ-696 62 Strážnice

Danio Revuservo de Dana Esperanto-Asocio Frederik Eriksen, Finsensgade 10, DK-4800, Nykobing F.

Estonio Virve Ernits, Mahla 65 — 1, EE — 0012, Tallinn

Finnlando Heta Kesälä, Kalamiehenkuja 3 D 32, FI-04300, Tuusula

Franco ~ Unuiĝo Franca por Esperanto, 4 bis, rue de la Cerisaie, 75004, Paris.

~ R.Melo, 34, Av. de Russie, FR-03700, Bellerive S/A

Germanio Dr. Wolfgang Schwanzer, Pfarrer-Seeger-Strasse, 9 D-55129 Mainz.

Irano Irana Esperanto-Centro, P.O.Kesto 17765-184, TEHRAN

Italio Itala Esperanto Federacio, Via Villorosi, 38, 20143, Milano.

Italio, Kroatio, Slovenio

Viŝnja Brankoviĉ, Via Leghissa 6, IT-34131 Trieste

Katalunio Kataluna Esperanto-Asocio, Apartat 290, ES-08200, Sabadell

Kubo Lazaro Azcuy Ravelo, str. 25 #5611 c/56460 Playa 11300, HAVANO

Litovio Litova Esperanto-Asocio, LT-3000, Kaunas, ab.k. 167.

Norvegio Norvega Esperantista Ligo, Olaf Schous vei 18, N-0572 OSLO

Pollando Maciej Wnuk, Skrytka 105, ul. Broniewskiego 77-137, PL-01-865 Warszawa

Svedio SEF, Lisbet Andréasson, Södra Rörum pl 455, SE — 24294 Hörby

Svislando Christoph Scheidegger, Im Schleedorn 6, CH — 4224 Nenzlingen

Usono

Esperanto Ligo por Norda Ameriko, P.O.Box 1129, El Cerrito, California 94530, U.S.A.

redakcie

Karaj legantoj!

Antaŭ vi estas la lasta kajero de ĉi-jara kolekto, kiu enhavas diversspecajn materialojn de niaj novaj kaj jam konataj al vi kontribuantoj.

Entute dum 2000 jaro en KOMENCANTO publikigis 54 aŭtoroj el 16 landoj. Inter ili debutis:

R. Zoldoŝ, (Jug.), C.Llapart (His.), E. de Freitas (Braz.), I.Sanguinetti (Braz.), P.Miles (Ang.) J.Kloker (Ger.), G.Ričert (Poll.), M.L.Segulu (Fr.), T.Alexander (Uson.), E.Kuznecova (Bjel) kaj S.Fedotov, T.Savina, M.Ĥohrjakov, A.Stazajeva, V.Makarenko, T.Ĝrammatikov, Ju. Ŝutov, L.Burgas, V.Sajtgarajev, I.Sabirova, V.Djakov, I.Belousov el Ruslando.

Krome per siaj desegnaĵoj plezurigis la aspekton de la gazeto jam konataj al vi pentristoj S.Kononova, N.Vinnikova, Ju.Perevalov, W.Thorne kaj la debutantoj: S.Naŭmoviĉ, I.Sabirova, M.Terjohina, A.Ĥismatullin, V.Habarov el Ruslando plus S.E.Bullo (Italio.), Y.C.Solis (Kubo), N.Sadretidinova (Uzbekio).

Karaj amikoj, ni dankas vin pro viaj kontribuadoj, reeĥoj, afablaj rimarkoj kaj proponoj kaj invitas ĉiujn legantojn de "K" esti pli kuraĝaj en la nova jarcento, provi ion verki, traduki, pentri por la plezuro de ĉiuj.

AGRABLAN LEGADON !

KOMENCANTO

2000 numero 8 / refundita en 1997/8 numeroj jare

redaktas kaj eldonas: Viktor Kudrjavcev
konstanta kunlaboranto: Rafija Jafasova
adreso:

620041, Ekaterinburg, ab. ja. 132, Ruslando

retpoŝto : let@epost.uralpost.ru

abontarifo por 2001

internacia tarifo: 13 eŭroj aŭ \$14;

orienteŭropa kaj latinamerika tarifo : \$11;

aŭ por ĉiuj — 15 IRK

konto ĉe UEA. vkud-a

ruslanda tarifo 78 rublej (za 8 nomerov v god) prostym poĉtovym perevodom na imja Kudrjavceva Viktora Vasильeviča: 620041, Ekaterinburg, a. ja. 132

Oni rajtas uzi bildojn kaj verkojn el KOMENCANTO. Sola kondiĉo - nepre menci KOMENCANTO'n kaj la nomojn de la aŭtoroj kun ties loĝlokojn.

Verkistoj de la 1-a literatura periodo.

Edmond PRIVAT

Karaj legantoj!

Ĉi-foje ni volonte prezentas al vi ankoraŭ unu el klasikuloj de esperanta literaturo, kiu komencis sian agadon en la unua periodo kaj fruktodone laboris en la sekvaj. Tio estas verkisto, kiu travivis tre meritplenan vivon — Edmond Privat.

Edmond Privat — franclingva sviso, naskiĝis 17 aŭg. 1889 en Ĝenevo; studis lingvosciencan kaj historion en Francio kaj Anglio, poste li fariĝis d-ro pri historio, docento ĉe la ĝeneva universitato. Franclingvaj libroj pri historio, verkita de E. Privat, meritas specialan atenton. Krome li estis pioniro de la popolklerigo en Svislando.

Jam dum la infanjaroj li lernis Esperanton, ankoraŭ kiel lerneano en 1903 fondis kun Hodler la gazeton „Juna Esperantisto”. En 1905, kiel 16-jara junulo, li piediris al la unua E-kongreso en Boulogne-sur-Mer, kie brile elpaŝis kun la parolo en Esperanto. Kaj en plua sia vivo kaj E-agado li estis unu el la plej bonaj oratoroj de E-to, kun facile komprenebla logika pensperado, klara stilo kaj agrabla prononcado. “Edmond Privat - la dolĉa vorto” — tiel poetike nomis lin K. Kalocsay.

Edmond Privat havas grandan meriton ankaŭ kiel propagandisto de Esperanto. En 1907-1908 li faris longajn vojaĝojn kun la propagandceloj tra Usono, Anglio kaj Francio, en 1911 - en Ruslando kaj Mez-Eŭropo.

De 1921-1928 li reorganizis kaj gvidis la internacian movadon, li prezentis Esperanton al la Ligo de Nacioj, estis ĉefa iniciatoro de la Someraj Universitatoj, prezidanto de UEA, prezidanto de Svisa E-Societo, aranĝis internaciajn konferencojn en E-to (de edukistoj - en Ĝenevo en 1922; de komercistoj - en Venezio en 1923, de Radio - en Ĝenevo en 1924 kaj aliaj).

Vere la tuta tiu-ĉi agado montras al ni, ke E. Privat kun sia fortega personeco plej multe faris por la sukceso de Esperanto Movado.

Specialan atenton meritas lia pedagogia agado: en 1908 jaro aperis du franclingvaj esperanto-lermolibro; en 1910 li verkis por komencantoj leĝolibron “Karlo”, kiu ĝis nun estas populara; en 1911 aperis ankaŭ populara rektmetoda “Kursa lernolibro”. Sed lia ĉefa lingvistika verko estas “Esprimo de sentoj en Esperanto”, kiu aperis en 1931 kaj kie li majstre analizas la trajtojn de la lingvo, kiuj ebligas ĝian vivantecon.

E. Privat estis la unua historiisto de la juna E-movado. En 1911 aperis unua parto de lia “Historio de Esperanto” (dua parto estis eldonita en 1927), kie tre detale kaj samtempe tre poetike li prezentas al ni historion de Esperanto. En la antaŭparolo de “Historio de esperanto” E. Privat skribis: “... Dume la du libroj helpu la novajn generaciojn iom pli funde koni kaj kompreni kiel semigis kaj kreskis el tero unu el la plej mirindaj greneroj de l’ homa penso”. Ĉi-sube vi povas legi malgrandan fragmenton pri literaturo el tiu ĉi verko de E. Privat

Nu, kio estas literaturo? Arto krei belon per lingvo. Certe la ĉefa celo de mondlingvo estas utilo, ne belo. Sed kiel malpermesi al artisto skribi pli elegante ol ordinara praktikulo? Kiel eviti, ke elokventulo parolas ĝin pli irmprese ol timema diskutanto? Lingvo ne povas esti laŭmende nur komerca aŭ nur teknika. El sentoj vivas la homoj multe pli ol per ideoj aŭ mendoj. Eĉ Zamenhof mem konfesis, ke li mem kaj la unuaj pioniroj de Esperanto ŝatis ĝin, “ne tial, ke ĝi alproksimigas reciproke la korpojn de la homoj, sed ne nur tial, ke ĝi alproksimigas iliajn korojn.”
[Kongresa parolado, Geneve 1906]

Nacia literaturo preskaŭ ĉiam esprimis en komenco la komunajn esperojn aŭ glorajn faraĵojn de sia gento. Nenio estis do pli natura ol tio, ke internacia lingvo kreis al si unue literaturon pri homaraj sentoj kaj aspiroj. En tiuj poemoj, same kiel en la komencaj naciaj, regas fervora kortuŝo. Kelkaj nomas ĝin naiva. Pli prave ili dirus “sincera”. Ankoraŭ tute ne elĉerpiĝis tiu bela fonto por la esperanta literaturo.

Dum sia vivo Privat, tiel multe dediĉis sin al la E-movada agado, ke li povis krei beletrajn verkojn, bedaŭrinde, nur junaĝe. En 1912 aperis poemkolekto “Tra l’silento”, pri kiu pli malfrue alia E-verkisto Julio Baghy skribis: “.. la unua verko, kiu sukcesis sugesti al mi la penson, ke Esperanto estas destinita por la poezio pro sia melodiasonoko”. En 1913 estis eldonita versa dramo-legendo “Ĝinevrá”, kie E. Privat prenas la temon el la keltaj fabeloj kaj rakontas historion de amo inter la edzino de Arturo kaj kavaliro Lance-loto. Tiu ĉi dramo estis dufoje surscenigita en la Berna (1913) kaj en la Ĝeneva (1925) kongresoj.

Kio ajn verkis Privat, liaj verkoj respegulis kristale klaran, garmonian stilon, senriproĉan lingvon kaj jam de la momento de sia apero ili forte influis esperantistaron.

Edmond Privat mortis en aŭgusto 1962, 73 jaraĝa. Post lia morto en 1963 sub titolo “Aventuroj de pioniro” estis eldonita libro, kiu enhavis liajn riĉajn spertojn, memorindajn renkontojn kun multaj jam historiaj personoj.

Nian rakonton pri E. Privat ni finas per lia originala poemo “Lasta kiso”

Edmond PRIVAT
(1889-1962)

Lasta kiso

Vi kien flugas, papilio,
Tremante kaj rapide ?
Jam mortis rozo kaj lilio
Kaj venas frost' perfide.

Flugiloj viaj kvazaŭ lampo
Brietas en nebulo.

Vi kion serĉas tra la kampo,
Perdita somerulo?

Dezertaj estas la ĝardenoj,
Tra kiuj vagis amo via.
Skeletoj ŝajnas la vervenoj
Sub kverko senfolia.

Vi kial flugas en malvarmo
Tra flora la tombejo?
Sur ĉiu loko pluva larmo
Nun restas en herbejo.

Silentas ĉiuj en la nestoj
Kaj svenis bonodoroj.
Jam ne batalos vi kun vespoj
Pri la floretaj koroj.

Jen restas nur en kampo vasta
Velkinta krizantemo,
Sur kiu kiso via lasta
Mortigos vin en tremo.

(1912)



Snejana Kononova [N. OMKA, Ruslando]

Ni ricevis informon de nia leganto el Germanio Jürgen Kloker pri la premio de Fame-Fondaĵo en la germania urbo Aalen por 2000 jaro.

La premion ricevis eminenta skota esperantisto, verkisto kaj poeto William Auld. La redakcio de "K" planas tre detale rakonti sur siaj literatur-historiaj paĝoj pri W. Auld kaj liaj verkoj.

FAME-FONDAĴO

La sud-germana urbo Aalen kaj la Fame-Fondaĵo honoras ĉiun duan jaron gravan gesperantiston kun la "Esperanto-Kulturpremio de la urbo Aalen". La premio konsistas el 10.000 DM (germanaj markoj) kaj estas la plej granda kultur-premio en esperantujo.

Ĉi jare oni transdonis la premion je la 15.10.00. jam la 7-an fojon en Aalen. La premiito estis la skoto William Auld.

W.Auld naskiĝis antaŭ 75 jaroj kaj esperantiĝis ekde 14 jaroj. Dum la dua mondmilito oni devigis lin al la brita aer-armeo. Poste li estis instruisto proksime de Edinburgh kaj ankaŭ estris gimnazion. Por esperantujo li estis verkisto kaj tradukisto. Liaj plej famaj verkoj estas inter alie la poemo "Spiro de l' pasio", "La infana raso", la lernolibro "Paŝoj al plena posedo" kaj diversaj tradukoj, ekzemple de Shakespeare aŭ Tolkien.

La solenaĵo komencis kun beleta muzikaĵo de akordiono kaj violono. Post la malferma parolo de sinjoro D-ro Schwerdtner, la unua urbo-estro de la urbo Aalen, la prezidanto de Fame-Fonduso Werner Boormann omaĝis al W. Auld.

Ĉar s-ro W. Auld grave malsaniĝis, s-ro Scherm anstataŭis lin. S-ro Scherm estas la prezidanto de la "Asocio de la germanaj esperantistoj-instruistoj". Li akceptis la premion de W.Boormann kaj esprimis koregan dankon al ĉiuj partoprenantoj. S-ro Scherm promesis, ke li transdonos la laŭdajn vortojn de W.Boormann, la parolon de s-ro Schwerdtner kaj la salutojn al W.Auld.

Fine estas menciita, ke pasintjare W. Auld estis kandidato por la literatura Nobel-premio. Tio vekis grandan atenton ne nur en la skotaj gazetoj. La Nobel-premion ricevis la germano Günter Grass.. Sed la esperantistoj fieras pri nia WILLIAM AULD.

Jürgen Kloker

FAME-Fondaĵo

Starigita de Alois Meiners en 1988 por subteni interkompreniĝon inter la popoloj, evoluhelpon, sciencan kaj esploradon, junularon kaj kulturon per disdono de subvencioj. Kune kun la urbestro de la urbo Aalen ĝi fondis premion "por distingi personojn aŭ organizojn, kies plurjara engaĝo antaŭtenigis internacian kompreniĝon."

Ni ricevis du poemojn de lernejoj, kiuj okupiĝas ankaŭ pri Esperanto en "Centro de Infana kaj Junulara Kreado" de urbo Ribinsk, Jaroslavska regiono, Ruslando. La redakcio dankas al Nadejda Gogulina, kiu kurafigis siajn lernantojn al tiuj provoj kaj sendis ilin al ni.

Novjaze, lizike kaj poetike

Krilova Elena (14 ja) [RIBINSK, Ruslando]

Donacoj de Avo-Frosto

Azĝentvintzo salutas
 novjazon,
 Ekludante plezuzo kun ĝi.

 Avo-Frosto gzatulas
 homazon
 Prezertante donacojn de si.

Li alportas en sako
 sukceson,
 Bonon, amon, ĝelicon
 poz vi.

Sed sopizon, malĝojon,
 forzeson
 Mem forpelas de ĉiu
 tuj li.



Gogulin Aleksandr (11 ja)
 [RIBINSK, Ruslando]

Bela pupeto

Hodiaŭ ekvidis
 mia ĝzantino

Tre belan pupeton
 en magazino.

Kun gzata plezuzo
 aĉetus ŝi ĝin,

Sed tio okazis
 suz bildovitzin'

pentris sur la paĝo **Nina Vinnikova**
 [NOVOALTAJSK, Ruslando]

Rudolf Zoldoŝ
[KANJIZA, Jugoslavio]

FATALA AVENTURO

Yonler Cables Soils [HOLGVON, Kubo]



Barono Lumpowski promenis sur la strato kaj rememoris pri sia amata bopatrino. Okaze de ŝia morgaŭa nomtago li volis surprizi ŝin. La promenanta barono rigardis diversajn montraĵojn fenestrojn kaj decidis aĉeti ion porcelanan por la "agrabla" maljunulino. Li eniris en vendejon de porcelanaĵoj kaj trovis la maŝtron en tre malbona humoro.

- Nu, kio okazis? Vi ja estas kolera, - li rimarkis.

- Jes, via barona moŝto. Mia servanto rompis multekostan vazon. Jen tie kuŝas ĝiaj pecoj! Mi perdis 500 florenojn. Juĝu vi

mem, ĉu mi ne havas kaŭzon por kolero?

Barono Lumpowski observante la pecojn de la iama multekosta vazo ekhavis diablan ideon.

- Mastro, mi aĉetas tiujn pecojn, kiom ili kostas?

- Ne moku, via barona moŝto! Kial vi bezonus tiujn balindaĵojn?

- Ne scivoladu pri la kaŭzo, - respondis la barono aplombe. - Mi nepre volas aĉeti ilin!

- Bone, pagu do kvin florenojn por ili.

Barono Lumpowski pagis dirante al la vendisto: "Paku la pecojn en lignan keston. Morgaŭ matene mia lakeo venos por forporti la pakajon."

Hejme la barono ordonis al sia lakeo, ke li morgaŭ matene alportu la pakajon kaj kiam li alportos ĝin en la salonon, ĉe la sojlo de la pordo ekstumblu, faletu kaj faligu teren la pakajon, poste senkulpigu sin pro la hazarda akcidento.

La postan tagon ĉio okazis laŭ or-

dono de la barono. La lakeo enirante en la salonon, kie kunestis la gebarinoj kaj la bopatrino, faligis la keston kaj oni povis aŭdi la tintobruon de la florzazo.

- Ve! Ekkriis la bopatrino kaj ŝi preskaŭ svenis, poste sekvis insultoj de la barono mem. Barono Lumpowski, ridetante en si pro la sukcesinta "arango" malfermis la keston, sed ekvidinte ĝian enhavon, li mem preskaŭ svenis pro la surprizo, - ĉar li konstatis, ke la servoplena komercisto pakis ĉiun pecon en apartan paperon...



Timur Rallov [Ekaterinburg, Ruslando]

William Thorne [LONDONO, Anglio]

La influo de vakeraj filmoj

Busa veturo

La busa veturo -
plena plezuro.
Kvazaŭ veluro
la vojo natura.
La rada murmuro -
ŝosea poluro.
Ĉiela lazuro
kaj nuba konturo,
Agrikulturo,
kastela konturo
kun turo.

Nenia teruro
kaj gaja humuro.
La kalemburo
pri ina figuro
kaj manikuro
kun luksa poluro,
bela femuro,
kaj *in*-aŭguro.
En manoj broŝuro,
literaturo,
karikaturo...

(Aleksandr Ĉernov)
[N.SALDA, Ruslando]


Limerike

Veturu per busoj, sinjoroj,
Ĉar busojn stiras ŝoforoj
Kaj vi sen problemo,
Sen ajna zorgemo
Atingos la celon en gloro!


(A.Ĉ.)



ĈU LA BUSO IROS AL URBO?



NE. SED VENOS ALIA POST
DEK MINUTOJ.




MI TRE DANKAS.

NE DANKINDE. КТП. КТП.

Waldemir Gasparino da Silva
esperantigis: **Evandro de Freitas**
[RIO de JANEIRO, Brazilo]

Sabirova Irina. [KIZILSKOJE, Ruslando]

Fablo



La speciala katosalto

Unu tagon knabo deziris preni al si katon,
sed ĝi estis tre ruza, ĉar ĝi saltadis al
ĉiuj lokoj.

Do la knabo petis de la kato montri ĝiajn saltojn, kaj la kato bonvole faris sian prezenton.
Ĝi saltis dekstren kaj maldekstren, antaŭen kaj malantaŭen, tio estas, ĉiuloken.

Dum tio, la knabo pensis al si: morgaŭ mi kaptos tiun katon!

Alvenis la tago, kiam la knabo vidis la katon trankvile promenanta. Li do diris al ĝi, ke nun estas horo de la tagmanĝo.

Kiam la kato venis por manĝi, tiam la knabo volis preni ĝin, sed la kato saltis alimaniere kaj la knabo ne sukcesis preni ĝin.

La knabo diris: "Tian salton vi ne instruis al mi."

La kato respondis: "Tian ne, ĉar ĝi estas la speciala katsalto!"

Surprizite la knabo diris nenion, sed la kato adiaŭe diris al li: "Ĝis revido!"

Jen la knabo komprenis la tiutagan lecionon: "la majstro ne devas tuj instrui ĉion al sia disĉiplo."

Kaj vi? Ĉu vi komprenis ĝin?

Zujeva Margarita
[MOSKVO, Ruslando]

Ĥasoj

Ĉasisto kaj perdriko

Unu ĉasisto kaptis perdrikon kaj volis ĝin buĉi.
Ekpetegis perdriko kaj diras:

— Ne buĉu min, mi al vi preparos tre multe da
perdrikoj kaj perfidos ilin al via volo.

Kaj respondis tiam la ĉasanto:

— Nun vi mortos de mia mano, ĉar vi perfidas
vian tribon kaj vian parencaron.


Do ni trinku vinon pro tio, ke perfiduloj ĉiam
kaj ĉie kaj en ĉiuj tempoj estu malestimataj ne
nur de la amikoj, sed de la malamikoj ankaŭ.

Akcipitro kaj anaso

Akcipitro kaptis anason kaj portis ĝin aere
ankoraŭ vivan en ungegoj.

Traflugis preter ĝi perdriko, kiun ĵus
fortimigis iu ĉasisto. Akcipitro postflugis
post la perdriko: kapti ĝin — sed la anaso
elŝiriĝis el liaj ungegoj kaj forflugis, kaj la
perdrikon ĝi ne atingis. Kaj restis sen io ajn.

Do, ni trinku pro tio, ke ne kuru vi post du
anaso, ĉar povas resti sen donacoj...



Perevalov Jurij
[LESNOJ, Ruslando]

Aforismo estas frato de anekdoto, amiko de paradokso kaj filo de saĝeco {N.Neksin}

AFORISMOJ

Elena Kuznecova
[VITEBSK, Belorusio]

*Pli bonas esti juna avo
ol maljuna patzo*

*La homoj povas esti
feliĉaj, nuz se la feliĉo ne
estas celo de ilia vivo.*

*Estas nenio pli
malsaĝa ol la dezito ĉiam
esti la plej saĝa*
{Laroŝfuko}

Arkady Davidoviĉ
Esperantigis:
Timur Halilov
[Ekaterinburg, Ruslando]

*En juneco ni vivas poz
vivi, en maljuneco - poz
elvivi*

*Aĝo - estas ĉio, kio
restis de la travivitaĵoj.*

*Se vi ne havas vizinon,
tio signifas, ke iu alia havas
du*

*La vizinoj ŝatas
promesojn, la vizoj -
espezojn.*

*La vizinoj vestiĝas poz
vizinoj, impresante vizojn*

*Kiam la vizoj pazolas
pri mono, ili pensas pri
vizinoj*

*Belaĵ, zicaĵ kaj saĝaj
vizinoj preferas belajn,
zicaĵajn kaj stultaĵajn vizojn.*

*Fraŭlo estas vizo,
edziĝinta kun sia zevo*

*Feliĉa familio:
enspezoj de la edzo egalas
al elspezoj de la edzino*

Zujeva Margarita
[MOSKVO, Ruslando]

*La plej alta plezuro
estas fazi plezuron al aliaj.*
{Konfucio}

*En familia vivo bastono
preskaŭ ĉiam havas unu
ekstremon*

*Ĉion la homo perdas
aĝe: jenecon, belecon, sanon,
impeton de gloro - kaj
nuz unusola stulteco neniam
forzlasas lin.*

*Vera prezo de helpo
ĉiam rekte dependas de tio,
kiamaniere oni helpas*
{Samuel Ĝonson}



Snejana Kononova [N.OMKA, Ruslando]

*Laŭdo kaj flato estas
du gastemaj mastroj. Nuz la
unua dzinkigas sian gaston
sufiĉe; sed la dua kutimigas
al tia dzinkado.*

{Samuel Ĝonson}

Rudolf Zoldoŝ
[KANJIZA, Jugoslavio]

*Homo, kiu fazas ezaron
kaj ne korektas ĝin - fazas la
duan ezaron.*

*Geamiko estas kiel
akvomelonoj - poz trovi unu
bonan - vi devas gustumi
centon.*

Karaj geamikoj !
En 2001 ni atendas
de vi novajn saĝajn
aforismojn kaj
spritajn proverbojn.
Bonvolu elekti kaj
kolekti, traduki kaj
sendi ilin al
KOMENCANTO!

Ĉu vi volas esti riĉa aŭ feliĉa?

Zujeva Margarita [MOSKVO, Ruslando]

Kion preferi? – Riĉon aŭ feliĉon?

Mi opinias, ke tia problemo estas tro subjektiva kaj efemera. Historiisto

Kluĉevski skribis: "esti feliĉa signifas

ne deziri tion, kion ne eblas ricevi"

Mi volus por mi konstante havi riĉon, fortunon kaj pli malofte - feliĉon



Snejana Kononova
[N.OMKA,
Ruslando]

Ne ekzistas baroj por varoj

Karaj geamikoj!

Publikigitaj en la kvina numero de "K" vortĉenoj sub la titolo "El la *tero* kreskas *bero*" havis bonan reĥon kaj la redakcio ricevis multajn interesajn ekzercojn.

Hodiaŭ ni proponas al vi novan vortan distraĵon, kiun oni povas uzi eĉ dum E-lecionoj por trejnigi vortscion. La tasko estas sufiĉe simpla — oni elektu iun gramatikan elementon, ekzemple, prepozicion aŭ afikson, kiel ĉe la apudaj ekzemploj. Poste oni aldonu finaĵon "o" kaj ĉe la maldekstra flanko literojn tiel, ke rezultigu iu vorto.

Oni povas grupigi la vortojn en la alfabeto ordo.

Oni povas fari konkurson - kiu el la lernantoj ekmemoros pli da vortoj parkere, sen uzi vortaron.

Oni povas tamen ne nepre uzi kiel kernon iun gramatikan elementon, sed ajnaj literojn.


Oni povas verki eĉ poemetojn, des pli ke la vortoj jam estas rimitaj.

Oni povas...

Oni povas elpensi kiel al oni plaĉas.

Ni plezure publikigos viajn vortĉenojn.

Do, ek !



az	el	en
baro	belo	beno
caro	celo	ĉeno
ĉaro	ĉelo	feno
faro	felo	geno
haro	gelo	ĝeno
jaro	ĝelo	heno
karo	helo	ieno
laro	kelo	jeno
maro	melo	keno
paro	pelo	peno
raro	relo	reno
varo	selo	seno
	ŝelo	teno
	velo	veno



Zoldoŝ Rudolf

[KANJIZA, Jugoslavio]

Du amikoj en restoracio. Unu el ili estas iomete surda.

Kelnero demandas:

— Kion deziras sinjoroj?

— Mi nenion, nur mi sidas kun mia amiko.

— Kaj vi? - demandas la kelnero la surdulon.

— La samon, sed kun la saŭco, - respondis la surdulo

Aristido kaj lia lakeo iris al rajt-placo.

— Jean, kial la ĉevaloj tiel rapide kuras?

— Por laŭro-krono, sinjoro.

— Kaj kiu el ili ricevos ĝin?

— La unua, sinjoro.

— Kial do la ceteraj tiel rapidas ?

Skoto al sia filo:

— Diru al via profesoro, ke ĝis kiam restos tiom malcerta politika situacio, mi ne aĉetos por vi la mondan maparon.

Kolektis kaj esperantigis **Timur Ĥalilov**
[Ekaterinburg, Ruslando]

Kurta fabelo kun logika fino

Unu firmao (ne gravas kia) komencis vendi varojn (ne gravas kiajn) per du prezoj — por stultuloj kaj por saĝuloj.

Sur la ŝildo do estis:

por *stultuloj* — unu prezo,

por *saĝuloj* — duoble pli koste

Kaj ĉiuj acetadis laŭ la pli kosta prezo.

Stultuloj !

Instruisto:

— Bonvolu respondi, kiel ni devas uzi la vorton " pantalon' ", ĉu en pluralo aŭ en singularo?

Lernanto:

— Supre en singularo, malsupre en pluralo.

Zujeva Margarita

[MOSKVO, Ruslando]

— Mi tiom multe legis pri malutilo de alkoholo, ke mi decidis ĉesi.

— Drinki?

— Ne, legi pri tio

— Mia edzino parolas en 4 lingvoj

— Mia en unusola, sed de mateno ĝis vespero

— Mia hundo estas tiom saĝa kiel mi.

— Estas strange. Kutime homoj laŭdas siajn hundojn.



Ĉiu tempo havas
sian rimarkindaĵojn!

Jurij Perevalov [LESNOJ, Ruslando]

KORESPONDU!

Ĉiu kadro kostas 10 rublojn por rusianoj aŭ 2 IRK por eksterlandanoj. Pagintaj abonantoj de "K" - senpage

Brasilio P. Pinto
interŝanĝas telefonkartojn
kaj invitas samideanojn
gasti

Av R Formoso 79,
BR 77470-000
Formoso Do Araguaia-to
BRAZILO

Aleksandro Gogulin
11 ja., pri muziko, dancoj,
kalendaretoj, E-kantoj

Katerskaja, 5-43
RYBYNSK
RU-152920
Yaroslavskaja obl.,
RUSLANDO

*Mohd. Nawaz kaj
Ali. Dar*

dez.koresp. tutmonde
Kashmir General Store,
Street 3,
Qadeerabad, PK-60000,
Multan.
PAKISTANO

s-ino Dinara Hazieva
18 ja., dez.kor. tutmonde pri
historio, urboj, muzikoj kaj
ĉiuj temoj. Resp.garantiata

P.k. 11623
TAŜKENTO
700085
UZBEKISTANO

Aleksandra Kruŝ
18 ja., studentino, tutmonde
pri div. temoj (muziko, spor-
to, lingvoj, interŝanĝi bk...

Frunze, 40-29
VITEBSK
210009
BJELORUSIO

Nataŝa Pitjeeva
12 ja., knabino int. pri angla
lingvo, desegno, sporto ...


Cherepanova, 9-78
RYBINSK
RU-152905
Yaroslavskaja obl.,
RUSLANDO

Aleksandr Sulepov
nova Esperanto-entuziasmulo,
korespondi tutmonde

Lenina, 2-2
VERĤOTURJE
Sverdlovskaja obl.,
RU-624380.
RUSLANDO

KOMENCANTO

gazeto por komencantaj aŭtoroj kaj komencantaj esperantistoj



W. T.

Via abono por via kaj nia bono!

RADIO AŬSTRIA INTERNACIA

Ni informas amplekse kaj aktuale pri politiko, kulturo, scienco, ekonomio,
kroniko kaj sporto. Disradias servizinformojn por feriantoj.

Aŭstria muziko donas al nia programo neintermikseblan karakteron.

Disaŭdigo okazas:

vendrede kaj dimanĉe 21:30 UTC je frekvencoj 6155 kaj 5945 kHz.

Niaj programoj krome aŭskultebblas ankaŭ per satelito kaj interreto: roi.esperanto@orf.at

Lubovj Noĥrina
studentino, pri la vivo de
studentoj tutmonde

Drujbi narodov, 16-113
NIŬNEVARTOVSK
Tjumenska obl.,
626440
RUSLANDO

Elena Kruglova

14 ja., junulino, pri ĉio, ŝatas
gitaron, kudras, pk pri animaloj
ktp

Kustova, 8-123
RYBINSK, RU-152935
Yaroslavskaja obl.,
RUSLANDO

Japano
Esperanto
Korespondo
Servo

Ĉiam konstante
akceptas korespondo-
proponojn kun japanoj.
Skribu unuope al:

Japano Esperanto-
Korespondo-Servo

ĉe KLEG,
Sonehigasi
1-11-46-204
TOYONAKA-SI
561-0802

JAPANIO

KOMENCANTO - 2001

Ĉu vi reabonis ?

